

esperanto USA

1995(1)

The ELNA Newsletter: News of the Language Problem and Esperanto as the solution

IN THIS ISSUE:

- Does Claude Piron Exist? 2
- Russia: The Weed of Crime
Bears Bitter Fruit 3
- Esperanto at Reed College 4
- The CEED Is Here! 5
- The Language of Science 7
- Questions on the Net 9
- The Best of '94 11
- Reviews: A British World
Federalist pushes Esperanto
and a Portuguese writer
makes his U.S. debut 12
- English Today and... 13
- Language in the News 14
- Pen pals and other people 15

IN TODAY'S NEWS: Prince Charles, speaking before the British Council, blamed the United States for the deterioration of the English language. Pictures at eleven.

Kongresu Novjorke!

NOVJORKO ALVOKAS VIN, ESPERANTISTO!

Ĉu vi ŝatas la internacian lingvon? Nu, vi amas la internacian urbon, Novjorko! Ne hazarde la novjorka ELNA-kongreso temos pri internacieco. Novjorko vere estas la ĉefurbo de la mondo, pro la sidejo de U.N. kaj aliaj internaciaj organizoj. Krome, Novjorko estas la monda ĉefurbo de la artoj, kaj plastikaj kaj spektaklaj.

Sed ne forgesu, ke la popolo de Novjorko estas eble la plej internacia de la mondo. Unu el tri enloĝantoj naskiĝis eksterlande, kaj tio estas evidenta ĉie. Eĉ en la plej altnivelaj negococentroj oni vidas homojn de diversaj etnecoj kaj lingvoj. Sed la koro de Novjorko estas ĝiaj etnaj kvartaloj. En unu posttagmezo, oni povas facile promeni tra hispana, juda, pola, ukraina kvartaloj, daŭre marŝi tra ĉina kaj vjetnama kvartaloj, kaj sidigi en "Italujeto" por trinki ekspresan kafon. Oni povas fine vespermanĝi en la hinda distrikto. Novjorko estas ideala urbo por promeni, kaj la lokaj esperantistoj intencas montri tion al vi.

Post tiom da marŝado, vi eble estos preta rapidi per la fama novjorka subvoja trajno. Ne timu, amiko, laŭ la plej lastaj statistikoj, Novjorko troviĝas ĝuste en la mezo de la listo de usonaj urboj, aranĝitaj laŭ sekureco kontraŭ krimoj. Kontraŭ \$1.25 vi povas iri viziti Arabujeton, Ruslandeton, aŭ Skandinavieton en Bruklino. Aŭ en Queens: Irlandeton, Kolombieton, Greklandeton, aŭ Koreieton. Aŭ ripozu en via ĉambro, kaj ĝuu la grandan nombron de dissendadoj en la lingvoj de la menciitaj naciecoj. Aŭ legu iliajn ĵurnalojn, revuojn, kaj librojn facile troveblajn en kioskoj ĉie!

La kongreshalo kaj la dormoĉambroj troviĝas en la mezo de la urbocentro en reviviĝinta kvartalo apud Penn Station. Do, kial ne plilongigi vian restadon en Novjorko je la malalta kosto de universitata dormoĉambro? La loka esperantistaro intencas organizi neformalan postkongreson por vi. Volontuloj ĉiĉeronos grupojn de samideanoj por viziti la vidindaĵojn dum la tago. Vespere, ni

gastigos neformalajn kunvenojn ĉe diversaj publiklokoj en la urbo, por ke ni povu daŭrigi la amikecojn. La postkongreso daŭros tri tagojn post la kongreso (18-20 de Julio), kaj eble ni havos piknikon je la sekvanta dimanĉo.

Do venu al la granda gastiganto, Novjorko. Vi estos turisto kun diferenco: vi jam havas amikojn ĉi tie. Kiu scias kiam tia okazo reestiĝos?

—Tom Eccardt

Peto por Prelego

"La valoro de Esperanto en internaciaj rilatoj" estos la temo de la 43-a ELNA kongreso. Tiel, ni memorfestos la 50-an datrevenon de la internacia organizo U.N. en la internacia urbo, Novjorko. Bonvolu pripensi la eblecon prelegi ĉe la kongreso. Kelkaj taŭgaj temoj estus: perspektivoj de Esperanto en Eŭropa Unio; Esperanto per la komputila interreto; Esperanto kaj turismo, ekz., Pasporta Servo; Historio de la rilatoj inter Esperanto kaj U.N.; Esperanto kaj internaciaj organizoj; esperantistaj infanoj ĉirkaŭ la mondo; ktp. Komprenoble, ankaŭ aliaj interesaj kaj aktualaj temoj estos akcepteblaj.

Se vi havas ideon por prelego aŭ seminario, bonvolu priskribu ĝin per du mallongaj alineoj. Sendu vian priskribon kun unu-fraza biografio al:

Thomas Eccardt
455 East 14th St.
Apt #3-C
New York, NY 10009

Se via prelego taŭgas, ni inkluzivos la alineojn kaj la biografieton en la kongreslibro. Bonvolu respondi kiel eble plej baldaŭ por certigi vian kontribuon en la kongreso!

EDITORIAL

Gastas Claude Piron sur niaj paĝoj

[Well-known European Esperantist Claude Piron (translator of songs, author, psychotherapist, sometime instructor at the San Francisco State University summer courses...) wrote the following letter to the New York Times. For some reason it was not published; but we thought that it ought to see the light of day somewhere. So here it is.]

Dear Editor,

I have been too busy to respond right away to Alex Ross's article published on November 27 about Esa-Pekka Salonen, the Director of the Los Angeles Philharmonic, but I guess an editor is interested in the readers' reactions even after a while. I'm referring to the following quotation:

"It 's like Esperanto. If you look at Esperanto from an objective point of view, it's the best language in the world (...). Yet no one speaks it" (p. 31).

It feels strange to find oneself rejected into nothingness. I speak Esperanto every day; if no one speaks it, I can only be no one. My wife speaks it as well: we're a couple of nobodies. I've spoken that language since I was a kid: have I ever existed? Travelling all over the world for the World Health Organization, I've used Esperanto in more than 60 countries. Often—for instance in Uzbekistan, in Bulgaria, in Japan—it has been more useful to me than English (I never have trouble understanding a Japanese or a Korean speaking Esperanto, but when they use English, I can hardly make out what they're talking about). I've even used Esperanto in your country. I taught in it twice (1981, 1983) at summer sessions of San Francisco State University. This is not just a California weirdness, I also used Esperanto in Manhattan: I was a co-founder of the UN Esperanto Club when I was a UN translator back in the early sixties. In 1986, at a world convention using Esperanto in Beijing, China, I met Rochelle Grossmann, a New Yorker who was a member of my first class at the UN. But my chatting with her in Esperanto must have been a hallucination, since *no one speaks it*.

Last Wednesday at 11:15 pm GMT, I

heard a regular program in Esperanto from Radio Sarajevo (on 6980 kHz). I don't know how the speakers managed to overcome their inexistence, but they did, and, believe me, it was moving.

A few days after your article, on December 10, Reinhard Selten received in Oslo his Nobel Prize in Economics. How come no paper mentioned that this prize was awarded to *no one*? This scientist is fluent in Esperanto. (1) As a matter of fact, at least four Nobel prize winners belong to the Esperanto community. If it weren't for Mr Salonen, we'd think: either speakers of Esperanto form a negligible population, but an impressive intellectual avant-garde, or the speakers of Esperanto are much more numerous than is usually believed (what is the ratio of Nobel Prizes to the world population?), but thanks to him we know that we hallucinate. Just as we hallucinated when we heard the pope pronouncing his Easter wishes in Esperanto, or read in the press that this language had just been adopted by Michael Jackson for a commercial to promote his CD *History*.

Of course, if you want to be objective, you have to consider another hypothesis, namely, that Mr. Salonen might be wrong. Indeed, if you check and double check, you'll discover a hoard of facts that do prove him wrong. For instance, that since 1985 Esperanto has been every single day, somewhere, the language of an international convention or gathering, (2) or that Esperanto speakers include, not only a recent Nobel Prize, but also a recent cardinal: Miloslav Cardinal Vlk, who was heading an Esperanto youth organization when the communists took over in Czechoslovakia in 1948 and who celebrated a mass in Esperanto in Prague as recently as October 9. Plus many, many confirmations that Esperanto is widely used in private relationships and in other fields. (3)

The question arises: how come Esperanto's existence and everyday use are so little known that most people, like Mr. Salonen, imagine they are stating the obvious when they are in fact distorting reality? Aren't the media responsible for that general ignorance? I'm afraid we are caught in an information vicious circle.

People don't know that Esperanto is a living language because the media never mention it, and the media never mention it because they're in the hands of people who don't know that Esperanto is a living language because the media never mention it, and the media never mention it because... This is sad, for when you compare in the field how communication works in the Esperanto world and in the world at large, you discover in the latter an incredible amount of suffering due to language handicap (just think of refugees) together with an ethically unacceptable use of taxpayers' money for obsolete communication systems (for *each single word* translated in the European Union or at the UN—they translate millions of words a day—you could save the lives of three children dying from diarrheal disease for lack of public funds!) (4)

Just in case you'd be interested in writing a story about this too little known sociopsychological and sociolinguistic phenomenon, permit me to draw your attention to the book I have just mentioned in a footnote: *Le défi des langues* ('The language challenge'). It contains a lot of information—always with the relevant references—that has never been published and presents in one volume data that are scattered among hundreds of publications in many languages. It exists only in French at the present stage, but who knows? Maybe somebody on your staff reads French and might be interested. If so, I can have a copy sent over to you. This book deals not only with Esperanto but with the whole field of international communication. It emphasizes the official resistance to facing up to the problems caused by language diversity and the consequent lack of consideration for a proper cost/effectiveness in the use of taxpayers' money by intergovernmental organizations. Don't you think that the readers of the *New York Times* deserve to get some objective information on this subject, which is so airily dismissed by Governments, international organizations and the media alike?

Daŭrigo sur paĝo 3

NEWSBRIEFS

Esperanto in the Media

"Esperanto is spoken here and by 2,000,000 other people" says Debbie Elliott of the Bolton, MA, Common (Sep. 23, 1994) in a favorable article based on an interview with Arnold Langberg, President of the Esperanto Society of New England. The article includes information on where and how to learn Esperanto. (article reproduced in *Verda Lumo*, Nov. 1994)

A short letter by ELNA Vice-President Sherry A. Wells in the *Detroit, MI, News* (Dec. 11, 1994) answers the statement that English is the current *lingua franca* by making a case for Esperanto. (sent by Sherry Wells)

"I am not, nor will I ever be, a linguist," says Robert Hough, quite correctly, at the start of a very long article about Esperanto in the *Toronto Globe and Mail* (Dec. 17, 1994). The article largely consists of (heavily commented) interviews of Toronto Esperantists Alice Kazmierowski, Joseph Lejderman, Pierre Savoie, Eduardo and Ramona Vivancos, and Imre Kadar. The general feeling given by the article is (not uncommon) sadness and sympathy for the recent or impending demise of Esperanto. (sent by Sherry Wells)

Guy Menahem recently appeared on *Ten Teen News* (Dec. 31, 1994), Tampa Bay Channel 10, where he was interviewed about Esperanto, the movement, and the newly formed Florida Esperanto-Ligo. (reported by Guy Menahem)

A recent issue of *World Citizen News* (Dec./Jan. 1995) carries a letter from ELNA Central Office Director Miko Sloper urging several of that newsletter's contributors to learn Esperanto, and giving them some idea of how to go about it. (provided by Miko Sloper)

An interview with Central Office Director Miko Sloper serves as the source

of a good article about Esperanto (with sidebar giving an example of the language) in the Charlottesville, VA, *Joy Gazette* (Jan. 1995). (provided by the Central Office)

Puzzle fans may be interested in working their ways through "Esperanto, Anyone?", a 15x15 word find containing 47 Esperanto words (and a fair number of other letters, some of which aren't found in the Esperanto alphabet), which appeared in *Superb Word-Find* (March, 1995). (found by Leah MacNeil, sent to us by Edveno Grobe)

Esperanto is mentioned several times in Will Foreman's book *Creating Democracy in Time*. (reported in *La Orient-Ekspreso*, Jan. 1995)

Sheila and Nancy Ostrander and Lynn Schroeder very positively mention Esperanto in their 1994 book *Superlearning 2000*. (reported in *La Orient-Ekspreso*, Jan. 1995)

ELNA member and World Federalist Vice-president Prof. Ronald Glossop mentions Esperanto several times in the context of a solution to the world language problem in his two books *World Federation? A Critical Analysis of Federal World Government* and *Confronting War: An Examination of Humanity's Most Pressing Problem*. (reported in *La Orient-Ekspreso*, Jan. 1995)

L.M. Boyd, in his syndicated trivia column "The Grab Bag", mentions Esperanto in the San Francisco, CA, *Chronicle* (Feb. 11, 1995). (reported by Steve Belant)

Not quite the news: If you happen to be in the Ranch Center, across the street from Smitty's, in Scottsdale, AZ, stop at the restaurant *Esperanto* and pick up some high-quality Italian food. (mouth-watering menu provided by the Central Office)

RABISTOJ TIMAS IMPOTENTECON

[La jena artikolo tute ne rilatas al la lingva problemo, sed estis afiŝita en la nova grupo soc.culture.esperanto de rusa esperantisto kiu uzas la plumnomon NikSt (legantoj de *Monato* certe konas la nomon). Mi opinias, ke esperantistoj trovos ĝin amuza ... kaj ke ĝi eble helpos konvinki eventualajn krimemulojn inter ni honestiĝi.]

Unu el moskvaj ĵurnaloj sub la titolo "Rabistoj timas impotentecon pli ol milicon" rakontas jenan historieton. De bone konata en urbo Belovo (Kemerova provinco, Siberio) sorĉistino Marija ĉe bushaltejo oni forŝiris de kapo felan ĉapelon. Deklarinte pri la fi-ago al milico, ŝi ankaŭ, pere de loka ĵurnalo *Kuzbass* [Mallongiĝo: Kuzneckij (ŝtonkarba) baseno] avertis nekonatan rabiston, ke se li ne redonos la ĉapelon, li baldaŭ iĝos impotenteco.

Post 3 semajnoj Marija en la sama ĵurnalo dankis la ŝtelistojn por la redonita ĉapelo, rimarkinte, ke ŝi neniel supozis, ke oni subĵetos en milicon pli ol 40 ĉapelojn. Jen kia fido je kapablecoj de sorĉistinoj kaj kia efektiveco de gazetaro!

Daŭrigata de paĝo 2

I wish you a happy New Year.

Sincerely yours,
Claude Piron

- (1) He confirmed it in two recent interviews in Esperanto magazines: *Monato*, December, pp. 7-10, and *Esperanto*, 87, 1065 (12), pp. 202-203.
- (2) A non-exhaustive list of such meetings is published every year in *Heroldo de Esperanto* (address: Via N. Sandre 15, IT-10078 Venaria Reale, Torino, Italy). See for instance the issue of March 24, 1994.
- (3) For instance, the Belgian firm Aqua Systems owes its success in having its equipment adopted in a large number of Chinese communities to the contacts it has had in Esperanto (*De Zeewacht*, Oostende, Belgium, September 2, 1994).
- (4) The sources of this information are quoted in my book *Le défi des langues* (Paris: L'Harmattan, 1994), pp. 39, 50-51 and 294.



REGIONAJ KAJ FAKAJ RAPORTOJ

Esperanto-Agado en Usono

District of Columbia

Okazis inaŭguro de la nova "Esperanto Curriculum Resource Center" la 11an de decembro. La centro, organizita de John Dale, havos amason da materialoj pri la instruado de Esperanto, kun esplormaterialoj pri la uzado kaj avantaĝoj de Esperanto in lernejoj, instrulibro, kaj aparta fako pri Esperantlingvaj infanlibroj el Ĉinio.

Esperanto-Societo de Washington, 5840 Cameron Run Terrace #714, Alexancria VA 22303, +1-703-960-3303

Michigan

La longtempaŭ bultenon de la Esperanto-Societo de Miŝigano, *La Semanto*, lastatempe anstataŭis kiel informilo la revuo *Miŝiganaj Informeroj*. Sed *La Semanto* ne malaperis, kaj nun aperas kiel jara malgrandformata literatura suplemento 24-paĝa, ankaŭ kun bela dukolora (verdablanka) kartona kovrilo. La revuo estas ricevebla ankaŭ de nemembroj de la Societo kontraŭ pago de \$5 al la suba adreso. La redaktoro, Ĝan

Ŭesli Starling, estas atingebla ĉe 224 Rose Place, Kalamazoo MI 49001-2617, +1-616-349-1327, CIS [70642,736].

Esperanto-Societo de Miŝigano, P.O. Box 3011, Southfield MI 48037

Nebraska

La 17an de decembro kvin geamikoj ariĝis en Lincoln por festi la datrevenon de d-ro L. L. Zamenhof, fondinto de nia mirinda lingvo. Alreta Fritts dankindas pro pretigo de la bonega festmanĝo. Post la manĝo la gastoj bonvenigis la kristnaskan sezonon per Esperantlingva kantado de krisnaskokanzonoj. Alreta pianludis. Ŝia filino Lois Yazdani, kiu havas unu el la plej belaj voĉoj en Lincoln, rapide lernis elparoli la Esperantajn literojn por ĉefkanti. (laŭ raporto en *NIA novaĵletero*, februaro-aprilo 1995)

Nebraska Internacia-Lingva Asocio, RFD 1 Box 29, Wilber NE 68465

New York

La 4an de decembro ĉe la Bahá'í centro

en Manhattan prelegis Jack Burwell pri *Speaking A World Language*. Li citis la vortojn de la fondinto de la baha kredo, Bahá'u'lláh, de lia filo, 'Abdu'l-Bahá, kaj de lia pranepo, Shoghi Effendi, pri la bezono de internacia lingvo kaj pri Esperanto mem. Jack montris la eldonaĵojn de la novjorka Societo, de ELNA, de UEA kaj de la internacia kaj usona Baha Esperanto-Ligo (BEL). Li disdonis folion kun la plej gravaj adresoj kaj telefon-numeroj de usonaj Esperantaj kontaktoj. Krome li disdonis "Update on Esperanto," "Esperanto at a Glance," kaj la unuan lecionon de la Poŝta Kurso. Al multaj demandoj li respondis. Ĉeestis proksimume dudek bahaanoj kaj ok esperantistoj. Post la programo okazis akcepto, de kiu la esperantistoj profitis por denove emfazi gravajn detalojn pri la lingvo. (Raportis Rochelle Grossman en *Novjorka Prismo*, Dec. 1994)

Esperanto-Societo de Novjorko, c/o UEA, 777 UN Plaza, New York NY 10017, +1-212-687-7041

ESPERANTO AT REED COLLEGE IN PORTLAND, OREGON

by Robert Wimmer

Each year during "Paideia", the semester break in January, Reed College [Portland, Oregon] offers a grand variety of special short courses. This year's "Paideia" offering included an intensive 3-hour introductory course in Esperanto taught by Robert Wimmer, a recently retired college instructor of German and Russian.

Student-teacher ratio at Reed is usually approximately 10 students to 1 instructor and this proved to be so in this course. Ages of the participants ranged from 18 to 62, and all of them had had some previous second language experience. Students who enrolled in this short course were told that they would be expected to take some

risks, to put their ego on the line, to make mistakes and learn from them and, generally, to laugh and have a good time.

After a five minute introduction in English regarding the methodology to be used, only Esperanto was spoken for the duration of the course. With the aid of flashcards, many and varied pictures, and very short prepared dialogs, the basic elements of the language were introduced and practiced interactively and extensively; these included: numbers and simple arithmetic functions, nouns and adjectives in singular and plural forms as the subject and then as the object (accusative) of the verb in rudimentary sentences, the present, past, and future tenses, the conditional mood and the imperative. A short narrative reading and finally an abbreviated fairy tale were presented. Students were expected to deduce the grammar of the language by intelligent guessing, var-

ied use of it, and ultimately teaching it to their peers. This involved students stepping forward and, with the use of the visual aids, asking questions, responding to answers, correcting mistakes and generally instructing each other. The emphasis was on 'learning' and 'peer teaching' throughout. All the participants 'played the game' expertly.

At the end of the course a packet was provided which included all the materials covered orally in class. Appended to this packet was a bibliography of most of the available Self-Teaching texts, as well as a list of many other ways to continue the study of Esperanto, including the free course offered by ELNA. All of the students expressed a strong desire to continue on their own. Everyone agreed at the conclusion that, although they were exhausted, their expectations had been more than fulfilled.

EL LA CENTRA OFICEJO

I am holding in my hand a book which has been anxiously awaited for many years. Yes, Benson's *Comprehensive English-Esperanto Dictionary* is at last a reality! Those who pre-ordered this dictionary should have received it already in the mail. Those who did not pre-order can make up for this oversight by ordering a copy now; it's already listed in the 1995 book catalog!

A proper formal review will appear in the next issue of *Esperanto USA*, but I would like to say a few words here about what makes this such an important development for the Esperanto movement in the English-speaking countries.

The CEED contains rich multiple entries for most words, rather than simple one-to-one translations. This allows for accurate expression in Esperanto of the trickiest English phrases. Also the range of vocabulary is amazing, for the technical jargon of many sciences and scholarly disciplines is included. This unprecedented combination of breadth and depth make the CEED a crucial tool for any serious translator who uses English as a source language. I hope that this dictionary will spur on many new projects translating classic American literature into Esperanto. In fact, there has been much discussion for many years about the eventual appearance of an *Usona Antologio*. This is long overdue, and the *Angla* and *Aŭstralia Antologioj* are already widely read. Perhaps many "back-burner" translation projects can be upgraded to active status now that the proper tool for the job is finally available. [By the way, if anybody is interested in editing the *Usona Antologio*, they should contact Don Harlow, who has long championed this project, but cannot spare the time now to edit it himself.] The appearance of the CEED will also demonstrate to the rest of the world that Esperanto is alive in the United States, and is still consid-

ered important among English-speakers despite the claims of the radical anglophiles that English is already "THE international language".

As you have read in this column and elsewhere, the United Nations will celebrate its fiftieth anniversary this June 26. The festivities and formal events will occur mostly in San Francisco, for the first UN meetings were convened there. Fortunately there will be several opportunities to promote Esperanto during the time when the world's media will be focused on the UN50 events.


Representatives of ELNA will state the case for Esperanto during a series of events from International Whole Earth Day (April 22) through the UN fiftieth anniversary (June 26). ELNA will sponsor an information booth at these and other events. The president of ELNA, Don Harlow, has been invited to attend several receptions and meetings in his capacity as president of a non-government organization which belongs to the United Nations Association Council of Organizations. It is a happy coincidence that the San Francisco State University Summer Esperanto Workshop begins on the very same day as the UN50 Charter Ceremony, so we hope to see all of the SFSU students and teachers at some of the UN events! [By the way, I hope many of you are seriously considering the Summer Workshop this year—it will be a fabulous experience with a great group of teachers! Write to me for details.] We shall be at the convention of the World Federalist Movement and their Youth '95 convention; we shall be at the United People's Assembly; we may participate in other forums and gatherings as well. I encourage you all as individuals and as members of local clubs to take advantage of these and other occasions to inform others about

the possible benefits of Esperanto for international organizations such as the UN, and to rally support for direct citizen diplomacy by means of this neutral language. We welcome any reports of your local campaigns and exhibits.

Two new local clubs have recently registered with the Central Office. The Florida Esperanto League was just created, and already has produced a club newsletter. Its founder, Guy Menahem, has even been interviewed on local television! And there is also a new club in Austin, Texas. I welcome these new clubs and encourage the establishment of others. ELNA's commissioner for local clubs, Don Coleman, is always ready to assist.

I would also like to inform you of recent developments in the American youth movement. The Usona Esperantista Junularo produces an excellent newsletter called *KTP!*, which is sent to all ELNA members under 27 years of age. If you are above the age limit, but would like to receive this attractive and fun publication, you can subscribe for \$15 per year. Those interested should simply send a check and explanatory note to us here at the Central Office. If you wish to further support the youth movement by way of a donation, please send it directly to Nathan Treadway, treasurer of USEJ. The next issue will certainly contain interesting stories about the recent successful USEJ weekend convention in Lancaster, Pennsylvania. The youth movement is flourishing, yet it still requires and deserves special support.

Amike salutas vin
Miko Sloper,
Direktoro, Centra Oficejo



ANONCOJ

[La rubriko *Anoncoj* enhavas diversajn reklametojn, petojn, ktp., kiuj estas diskonigindaj sed ne povas trovi lokon en alia rubriko. Nek ELNA nek la redaktoro povas promesi aŭ prirespondecigi definitivon plenumon de io ajn promesita en anonco.]

La Montpellier-a kultura esperantocentro organizas internacian esperantosemajnon en Sète, havenurbo situanta 30 km. sud-okcidente de Montpellier, de la 2-a ĝis la 9-a de septembro 1995. Vi povos ripozi, bani en Mediteranea maro, viziti vidindaĵojn, travivi internacian etoson, manĝi bongustaĵojn, eklerni la Internacian Lingvon aŭ perfektigi vian konon pri ĝi, mallonge ĝui agrablajn restadon. Informas: Yvette VIERNE, 5, Rue du Docteur Roux, FR-34000 MONTPELLIER, Francio, tel. +33 67 54 15 43.

La "Cercle Biterrois d'Espéranto" organizas printempan staĝon de la 24-a (posttagmeze) ĝis la 28-a (posttagmeze) de majo 1995 (inicado kaj progresigaj kursoj). Loko: feridomo Batipaume inter Mediteranea Maro kaj urbeto Agde (Hérault) en Francio. Informas: Cercle Biterrois d'Espéranto, 9, Rue G. Picot, FR-34500 BEZIERS, Francio.

Por Mensa-anoj kaj Mensa-aspirantoj: la fako Espermenso rekomenciĝos. Donu viajn nomon kaj adreson al ĝia kunestrarano Sherry A. Wells, P.O. Box 1338, ROYAL OAK MI 48068, tel. +1-810-543-5297.

Komenciĝos grupo de esperantistoj-Unitarianoj-Universalistoj. Donu viajn nomon kaj adreson al ĝia kunestrarano Sherry A. Wells, P.O. Box 1338, ROYAL OAK MI 48068, tel. +1-810-543-5297.

La sesa unusemajna mezusona somera Esperanto-kursaro okazos en la urbo Detroit inter la 7a kaj la 11a de aŭgusto, 1995. Por informoj: Sherry A. Wells, P.O. Box 1338, ROYAL OAK MI 48068, tel. +1-810-543-5297.

La entrepreno Kava-Pech Eduka kaj Turisma Entrepreno proponas la jenajn aranĝojn en majo de la nuna jaro: "Simpozio Entreprenado pere de Espe-

ranto" en Dobrichovice, la 10an ĝis la 14a de majo; kaj la "Itinero laŭ la soldato Ŝvejk" la 14an ĝis la 20a de majo. Kondiĉoj estas haveblaj de la firmao. Kava-Pech ankaŭ pretigas aliajn aranĝojn por la venontaj aŭtuno kaj vintro (film-videa konkurso, flugkaravano al Orientazio, skisemajno). Por informoj: d-ro Petro Chrdle, Anglická 878, CZ-25229 DOBRICHOVICE (Prah), Ĉeĥio, tel./fakso +42 2 991 2126.

La Organiza Societo de Internaciaj Esperanto-Konferencoj aranĝas Internacian Esperanto-Konferencon 1995, kiu okazos la 15an ĝis la 21a de julio en Varsovio, Pollando. La ĉeftemo estos: Ivo Lapenna—Vivo kaj Verko. Informoj kaj aliĝiloj estas haveblaj de: Eric Laubacher, 1 rue des Vosges, FR-78180 MONTIGNY-LE-BRETONNEUX, Francio, tel. +33 1 30 96 67 91, ret. eric@frmug.fr.net, aŭ de "NEPO", Maciej Wnuk, skrytka 105, ul. Broniewskiego 77 m. 137, PL-01-865 WARSZAWA, Pollando, fakso +48 2 633 53 15, ret. nepo@maloka.waw.pl.

La Kosmologio de Martinus estas logika vivklarigo kiu kondukas al pozitiva vivsinteno—kaj al pacaj kaj harmoniaj rilatoj inter homoj. Legu pri la kosmologio en la nova revuo Kosmos. Petu senkoston provekzempleron ĉe Martinus-Instituto, Mariendalsvej 96, DK-2000 KØBENHAVN F, Danio, tel. +45 3834 6280, fakso +45 3834 6180.

Posteno haveblas por instruistino de Esperanto en la regiono Kagawa en Japanio. Periodo estos por minimume unu jaro, eventuale du ĝis kvin. Salajro estos \$700/monate; loĝado kaj manĝoj estos provizitaj. Oni pagos la dudirektan flugkoston. Oni povas ricevi paĝon kun informoj pri la posteno de: S-ro MIJOSI Ecuo, Japanio 769-27 KAGAWA, Oookawa-gun, Siratori-co, Macubara 981, tel. +81-879-25-3958, fakso 81-879-25-5265.

Okazos en Budapeŝto, Hungario, Konferenco pri ekonomio kaj Esperanto kaj 11a Simpozio de Esperantoturismo, okaze de la Internacia Foiro en Budapeŝto, inter la 20a kaj 24a de majo 1995. Pri novaj rimedoj por disvastigi Esperanton. Por informoj: Movilo, HU-

1157 BUDAPEST, Nyírpilota ut 107, Hungario, tel. +36-1-271-9510, fakso +36-1-163-4840.

Okazos en Százhalombatta-Boatejo, Hungario, Esperanto-Lingvotendaro por ĉiuj generacioj inter la 1a kaj 7a de julio 1995. En la provizora programo: ekskursoj al Budapeŝto, al Balatono-Lago, interkona kaj adiaŭa vesperoj, bivakfajro, luda instruado de ludilpreparado, infandeseĝajkonkurso, strando, boatado, vizito de ĉevalbredejo, komuna subĉiela kuirado de hungara gulaĝo. Por informoj: Movilo, 1157 BUDAPEST, Nyírpilota ut 107, Hungario, tel. +36-1-271-9510, fakso +36-1-163-4840.

Okazos en Grandebenaĵo Hortobágy, Hungario, Internacia renkonto de naturprotektantoj inter la 15a kaj 21a de aŭgusto 1995—konferenco pri la temo, kiel savi la originalan naturan vivon de la granda hungara ebenaĵo kun prelegoj de hungaraj kaj eksterlandaj sciencistoj de naturprotektado. Por informoj: Movilo, HU-1157 BUDAPEST, Nyírpilota ut 107, Hungario, tel. +36-1-271-9510, fakso +36-1-163-4840.

Okazos ĉe la Lago Balatono, Hungario, Kultura renkonto de esperantistoj de najbaraj landoj de Hungario, inter la 12a kaj 15a de oktobro 1995. La temo de la konferenco estos komuna kultura laboro; en la provizora programo troviĝas konferencaj kunsidoj, vinrikolta festo, ŝipekskurso tra Balatono, folkloraj programoj. Por informoj: Movilo, HU-1157 BUDAPEST, Nyírpilota ut 107, Hungario, tel. +36-1-271-9510, fakso +36-1-163-4840.

Litova Esperanto-Asocio invitas vin partopreni vicajn tradiciajn somerajn 31ajn Baltiajn Esperanto-Tagojn (BET-31) en la arbarista lernejo en Girionys, 17 km. sudoriente de Kaunas, la 8an ĝis la 16a de julio, 1995. Celoj kaj taskoj estas studi problemojn de Esperanto-movado, elstarigi taskojn de Esperanto-agado, interŝanĝi sperton pri esperantista agado, perfektigi en Esperanto, enhavoriĉe pasigi la tempon. Por pliaj informoj: Litova Esperanto-Asocio, LT-233000 KAUNAS-C, ab.d. 167, tel. +370 7 20 85 03.

En Usono troviĝas nova peranto por la evangelia organizo Kristana Esperantista Ligo Internacia (KELI). Por informoj: Cornelius J. McKown, 460 Orlando Ave., STATE COLLEGE PA 16803.

A TALE OF TWO LANGUAGES

Mark Atkinson.

The New Scientist,

No 1966 (1995-02-25). p. 43.

[La jenan artikolon afiŝis al la reto s-ano David Galadi-Enriquez de Hispanio okaze de longa disputo pri la eventuala uzado de Esperanto en la Eŭropa Unio. Grandparte partoprenis kontraŭuloj, kies nombro pliparte konsistis el—ĉu surprize?—usonanoj kaj angloj, kiuj jam konvinkiĝis, ke la angla estas destinita fariĝi la ĉeflingvo de unuiĝinta Eŭropo. La originala artikolo aperis en la angla; s-ano Galadi-Enriquez tradukis ĝin en Esperanton. Sekvas kelkaj liaj komentoj:

En la revuo *The New Scientist* mi trovis interesan artikolon, en kiu anglalingva sciencisto rakontas sian lingvan sperton en Francio. Li ĉarme priskribas la paradoksan sperton farti, ke la propra lingvo estas pli-malpli konata de ĉiuj en la medio kaj, samtempe, ĝi ne utilas kiel efika komunikilo. Ĉi tiu artikolo enhavas ankaŭ bonan kvanton da humileco (tre ofte necesa medicino—ni tion konstatis en tiu ĉi forumo—por nepentemaj imperiismaj anglalingvanoj), kaj konsistigas rektan konfesion pri la fakto, kiu igas Esperanton esti pli taŭga ol iu ajn nacia lingvo por internacia scienca komunikado: la angla netolereble favoras anglalingvanojn je publikigo en internaciaj magazinoj kaj kunvenoj.

Jen, dukolone, la originala angla teksto (dekstre) kaj mia postpenadega esperanta kvazaŭtraduko (maldekstre). Mi inkluzivas la originalan anglan version kvarkiale:

1) Mi havas ĝin. Do, ne implikas pli da laboro ĝin inkluzivi ĉi tie.

2) Mia rego de la angla lingvo estas tre malbona. Mi tradukis la tekston post longa lukto per kelkaj vortaroj. Mi esperas, ke la fina rezulto ne ŝajnos “as if it had almost been turned word for word” el la angla en Esperanton. Certe mi faris multajn erarojn kaj la ĉeesto de la angla originalo utilos al tiuj, kiuj parolas ne nur Esperanton, sed ankaŭ la anglan.

3) Eble iuj, kiuj parolas nur la anglan (kaj ne Esperanton) legos ĉi-mesaĝon kaj lernos ion el Mark Atkinson.

4) Se iu el vi trovas la tekston sufiĉe interesa, do vi povus verki mallongetan anglalingvan enkondukon kaj ĝin afiŝi en iu angla interneta forumo.

Mi retenas la dukolumnecon por tiuj, kiuj ankoraŭ lernas Esperanton kaj volas havi komparan tekston por legi. Mi cetere korektis unu-du erarojn en la Esperanta traduko de s-ano Galadi-Enriquez, kie la angla originalo evidente trompis lin.]

Ekzistas pluraj motivoj por tenti scienciston labori eksterlande. Mia motivo estis simpla: mia kontrakto ĉe John Innes Centre en Norwich preskaŭ finiĝis, kaj mi estis invitita labori kun unujara kontrakto ĉe agrikultura esploralaboratorio en Clermont-Ferrand, centra Francio. La laboro estis disvolvi komputilan programon por laboratorio dediĉita al genetik-mapado. Sed post kelkaj tagoj, kiam ĉiuj tie malkovris, ke anglo alvenis, mi trovis, ke mi havas ankaŭ duan laboron.

Eble la plej profunda leciono, kiun mi lernis en Francio estis, kiel fortunate estas por sciencisto havi la anglan kiel denaskan lingvon. Ĉar tiel oni ne bezonas lerni alian lingvon por publikigi internacie, dum por fari tion en Francio oni devas skribi en la angla. Kion, do, faras franca sciencisto? Normale, li aŭ ŝi sendas la manuskripton al eldonisto [redaktisto], kiu sendas ĝin al du arbitraciistoj, kiuj resendadas al la aŭtoro instrukciojn por ŝanĝi la tekston el la “francangla” en la anglan. Se hazarde estas milda [malsovaĝa] angla sciencisto en la sama koridoro, do ili ŝparas [tiu ricevas] la laboron tra legi la francanglan manuskripton kaj ĝin angliigi.

Estas surprize, kiel neantaŭvidebla povas esti la rego de la angla lingvo de francaj sciencistoj. Iuj, kiuj neniam parolis eĉ unu vorton angle, povas skribi la anglan preskaŭ senerare. Aliaj, kies parola angla lingvo estas sufiĉe flua, estas tiel malbonaj je skribo, ke al la angliganto estus pli facile tute eltraduki la verkon ol ĝin korekti.

Estis arbitraciisto, kiu unuafoje prezentis al mi la koncepton “francangla”. Mi estis korektinta manuskripton en ion, kio ŝajnis al mi perfekte bona angla lingvo, kaj tial mi iom konsterniĝis kiam la manuskripto revenis el la arbitraciisto, kun la komento, ke la verko “estas tradukenda el la francangla en la anglan”. Mi solvis la misteron, kiam mi rigardis la revenintan manuskripton kaj mi konstatis, ke la aŭtoro aplikis nur parton el miaj sugestoj. Post tio, mi ne dediĉis la saman penadon por

There are many reasons to tempt a scientist to work abroad. My own was simple: my contract at the John Innes Centre in Norwich was drawing to a close, and I had been invited to work on a one-year contract at an agricultural research laboratory at Clermont-Ferrand, in central France. The job was to develop computer software for a genetic mapping laboratory. But within a few days, once people had discovered that an Englishman had arrived, I found I had a second job, too.

Perhaps the most profound lesson I learnt in France was just how fortunate it is for a scientist to have English as his or her native language. For then you don't need to learn another language to publish internationally, while to do this in France you must write in English. So what does a French researcher do? Normally, he or she sends the manuscript to an editor, who sends it to two referees, who send the instruction back to the author to change it from “Frenglish” to English. If there happens to be a tame English scientist down the corridor, they get the job of reading the Frenglish manuscript and turning it into English.

It is surprising just how unpredictable a French scientist's grasp of English can be. Some who have never spoken a word of English can write it virtually faultlessly. Others, whose spoken English is reasonably fluent, are so bad at writing that it would have been easier for the Englisher to translate it than to correct it.

It was a referee who first introduced me to the concept of Frenglish. I had corrected a manuscript into what I thought was perfectly good English, and so I was rather dismayed when the manuscript was returned with the referee's report that the paper “ought to be translated from Frenglish into English”. I solved the mystery when I checked the returned manuscript, and found that the author had taken up only a few of my suggestions. After that, I didn't put quite the same effort into rewriting sentences

reskribi frazojn, kiuj ŝajnis al mi ne tute ĝustaj, kaj mi limigis mian laboron al la korektado de signifoj.

Nun frapas mian memoron verko skribita en preskaŭ perfekta angla lingvo, en kiu, tamen, la aŭtoro uzis la frazon: *The plants were pulverised*. La francan vorton *pulvériser* [aspergi] oni tradukas en la anglan *to spray*. Ĝi estas unu el la *faux amis* [falsaj amikoj], pri kiuj oni avertas anglalingvanojn, kiam oni instruas al ili la francan: vortoj, kies sonoj estas tre similaj en ambaŭ lingvoj, kaj tamen ili havas tre apartajn signifojn. Alia vorto, kiu ofte kaŭzas problemojn estas *actuellement* [nuntempe]. Ĝia ĝusta angla traduko estas *now*, sed oni ofte trovas ĝin tradukitan kiel *actually* [fakte, reale, verdire]. Do, la francangla frazo *Wheat is actually the first crop in the world* [kiun anglalingvano komprenus kiel "tritiko estas, fakte, la unua monda kultivo"] signifas "nuntempe, tritiko estas la ĉefa kultivo en la mondo". Unu el miaj kolegoj iam venis al mi en ŝok-stato, portante tradukitan resumon supoze faritan de "profesia" tradukisto. Ĝi ŝajnis rekte tradukita vorton post vorto el la franca en la anglan, kaj mi ŝercis, ke oni eble produktis ĝin per aŭtomata tradukmaŝino. La originala franca versio enhavis la esprimon *établissements de selection*, kies traduko en la anglan estas *plant breeding companies* [plantbredaj kompanioj]. Tio estis tradukita kiel *selected establishments* ["elektitaj vendejoj", au io simila].

Nelonge post la komenco de mia laborado tie, evidentiĝis al mi, ke multaj francaj sciencistoj estas, ne malnature, rezistaj al la uzado de la angla. Mia grupestro kunportis min al kunveno en Parizo kaj dum la vojaĝo tien li certigis, ke la labordiskutoj estos, respektive al mi, en la angla. Tuj post la komenco, ĉiuj parolis la francan. Mi faris mian mallongan disertadon en la angla, kaj la ĉeestantaro diskutis ĝin—en la franca. Do, mi rezignis, kaj dediĉis mian tempon al plibonigi mian posedon de la franca lingvo.

Post ses monatoj, mi komencis farti iom fiera pri miaj progresoj, sed igis min subite surteriĝi *Monsieur le chef* [S-ro estro] dirante: "Min surpizas tio, ke via franca lingvo ne estas pli bona post tiom da tempo. Kiam mi iris al Usono kiel studanto, mi ne sciis la anglan, kaj post ses monatoj mi ĝin parolis flue."

Kelkaj el ni ŝajnas ne tiel lertaj por lerni lingvojn. Mi intencis per miaj propraj rimedoj lerni la francan de kiam mi eksciis, ke mi iros labori en Francio. Mia lernomaniero estis pensi min mem en la franca, skribi la vortojn, kiujn mi ne konis, kaj serĉi iliajn signifojn poste. Mi aĉetis du grandegajn vortarojn, unu el ili por ĝin uzi ĉe la laborejo, kaj la alia por hejma uzado.

Ĝuste antaŭ mia foriro el Francio, nia Instituto organizis internacian konferencon. La resumoj el la komunikaĵoj venis el ĉiuj landoj en Eŭropo, kaj oni disdonis ilin inter la membroj de la Instituto por eldonado. Oni ne petis, ke mi partoprenu, eble ĉar miaj kolegoj pensis, ke mi devus dediĉi mian tutan tempon al finado de mia propra laboro. Estis amuze vidi ilin serioze diskutantaj pri angla gramatiko kaj and *oooh la la*-ante [*oooh la la* estas franca interjekcio por surprizo] pri la terura kvalito de la orient-eŭropa angla lingvo.

Iam mi demandis, kion ili faris antaŭ mia alveno. "Nu, ni petis al sinjorino Truc legi niajn manuskriptojn." S-rino Truc naskiĝis en Anglio, sed ŝi vivas en Francio dum dudek jaroj. Tial, ŝi estis pli tolerema ol mi pri francangla kaj, do, mi estis preferata. Sed mi supozas, ke nun ŝi reakiris sian duan laboron, kaj ŝi konservos ĝin, ĝis kiam alia neatendita [*nesuspektanta*] *anglais* [anglo] alvenos. Fakte, la Instituto havas multajn

that seemed not quite right, and limited myself to correcting meanings.

One paper that sticks in my mind had been written in virtually perfect English, but the author had used the phrase: "The plants were pulverised." The French word *pulvériser* means "to spray" and is one of the *faux amis* they warn you about when you learn French: words which sound similar in the two languages but which have different meanings. Another which often causes problems is *actuellement*, which means "now" but is often translated as "actually". So the Frenglish sentence "Wheat is actually the first crop in the world" means "At the present time, wheat is the world's principal crop". One of my colleagues came to me in a state of shock one day, with a translated extract from the institute's annual report, supposedly done by a "professional" translator. It read as if it had almost been turned word for word from French into English, and I joked that it had probably been done by machine. The French original had included the phrase *établissements de selection*, which means plant breeding companies. This had been translated as "selected establishments".

Not long after I started the job it became clear that many French scientists are, not unnaturally, a little reluctant to speak English. My team leader had taken me to a meeting in Paris, and on the way had assured me that the proceedings would, for my benefit, be in English. Right from the start, everybody spoke French. I gave my short presentation in English, and my audience discussed it—in French. So I gave up, and concentrated on improving my French.

After six months I was becoming quite proud of my progress, only to be brought down to Earth by *Monsieur le chef* when he said: "I am surprised your French is not better after all this time. When I went to the US before I was a student I knew no English. After six months I was fluent."

Some of us just don't seem to have this gift for languages. I had been trying in my own way to learn French from the moment I knew I was going to a job in France. My way of learning was to think myself in French, write down words that I did not know, and look them up later. I bought two enormous dictionaries, one to keep at work and the other for home.

Just before I left France, our Institute hosted an international conference. The abstracts came from all over Europe, and were shared out for editing by various members of staff. I was not asked to help, presumably because my colleagues felt that I should be left to concentrate on finishing my proper work. I was amused to see them earnestly discussing points of English grammar among themselves, *oooh la la*-ing about the appalling standard of East European English.

What, I once inquired, did they do before I arrived? Ah, we asked Madame Truc to read our manuscripts. Mme Truc was born in England but had lived in France for 20 years. Because of this, she was more tolerant of Frenglish than I was, so I was preferred. But I suppose now she has her second job back, and will keep it until some other unsuspecting *anglais* comes along. After all, the institute has many visitors from all parts of the

vizitantojn el la tuta mondo, aŭ “el la kvar anguloj de heksagono”, kiel oni diras en tiu parto de Francio.

Se vi havas la ŝancon iri eksterlanden, mi rekomendas al vi, ke vi ĝin profitu. Tio estas sperto, kiu pligrandigos viajn horizontojn. Sed, antaŭ ol foriri, sekvu lingvan kurson se vi povas aŭ, almenaŭ, aĉetu vortaron. Mi ne povas paroli pri aliaj nacioj, sed mi trovis la francojn—eĉ ŝtatoficistoj—universale helpemaj kaj afablaj kiam mi bataladis kun ilia lingvo. Aŭskultu zorge tion, kion denaskuloj diras, kiel ili tion diras, kaj kion ili emfazas. Kiam vi revenos en Briton, vin mirigos kiel multe vi absorbis la lingvon, eĉ se tio ne evidentiĝis al vi, dum vi estis eksterlande.

Mark Atkinson estas plantekologiisto ĉe la Universitato de Wolverhampton.

world, or “from the 4 corners of a hexagon”, as they say in that part of France.

If you get an opportunity to work abroad, I recommend that you take it. It is a horizon-broadening experience. But before you go, do a language course if you can, or at least buy yourself a dictionary. I cannot speak for other nations, but I found French people—even the officials—universally helpful and courteous as I struggled with their language. Listen carefully to what the natives say, how they say it and what they emphasise. When you return to Britain, you will be amazed at just how much of the language you have absorbed, even if it did not seem that while you were away.

Mark Atkinson is a plant ecologist at the University of Wolverhampton.

KIEL RESPONDI AL STULTAJ RETAJ DEMANDOJ?

de Sylvan Zaft

[*Fine de januaro, Miko Sloper de la C.O. afiŝis al kelkaj retaj grupoj demandon pri la lingva situacio en la Eŭropa Unio. La respondo estis sufiĉe rapida kaj trafa, sed sekvis longega kaj akra disputo pri la demando “Esperanto”. Estis interese rimarki, ke Esperanton ĉefe kontraŭis britoj kaj usonanoj (eĉ ne anoj de la EU!), dum la por-Esperanta grupo estis rimarkinde internacia. La disputo ampleksis centojn da diversaj afiŝoj, kaj ankoraŭ ne finiĝis. Pro ĝi, la jena ĵus*

